

MIA POEZIO

(Originale esperante verkita)

~ DE ~

Rafael de San Millán Alonso

ELDONITA

de

Hispana Esperanto Asocio

MADRIDO, 1932

Presejo: CHULILLA y ANGEL

Torrecilla del Leal, 17

VERKARO

DE

JULIO MANGADA ROSENÖRN

«*Pri Hispanujo kaj ĝiaj popolĝantoj. Popolĝantaro de Murcia*», originale kaj elĉerpite verkita, 51 pĝ., 13,5 × 19,5 cm., ilustrita, kun muzikaĵoj, luksa papero. Prezo: UNU sv. fr.

«*El Moderna Hispana Parnaso*», tradukitaj poemoj, 32 pĝ., sama formato, kun belegaj ilustraĵoj sur luksa papero. Prezo: 11,15 sv. fr.

«*Du junaj fraŭlinoj*» kaj «*Korneliino*», du noveloj el la bonekzemplaj de Miĥaelo Cervantes (aŭtoro de «*Kiĥoto*»), 70 pĝ., sama formato. Prezo: 1,75 sv. fr.

«*Ferdinando VI kaj Farinelli*», historia novelo proze kaj verse originale verkita, 32 pĝ., sama formato. Prezo: 0,70 sv. fr.

«*La Genia Kavaliro Don Kiĥoto de la Mancha*», tradukaĵo entenanta «*Rimarkoj pri la titolo de la verko*», la «*Dediĉo*», la «*Prologo*» (kun la versaĵaro) kaj la lan. Ĉapitron el la fama verko de Miĥaelo Cervantes, 31 pĝ., 12 × 16,5 cm. Prezo: 0,60 sv. fr.

Pri la verkoj sufiĉas kopii tion, kion sur «*Heroldo de Esperanto*» diris s-ano. M. Butin, L.K.: «*Ĉio, kion s-ano. Mangada verkas, atingas la altan nivelon de neofte trovata akurateco kaj kompleteco. Li ne kreas legaĵojn, kiujn oni ne plu reprenas el la libraro post unufoja legado; valoraj ili estas kaj tre atentindaj.*»

Samideanoj povas havigi al si la kvin verkojn sendante antaŭpage 2,50 sv. fr. al la aŭtoro (Leŭtenanto Kolonelo de la 1^a Regimento de Infanterio, Madrid, Hispanio), kiu, neniam celante propran personan profiton, proponas la verkojn laŭ prezo pli malalta ol la preskosto. En tute DUCENT DEKSES PAĜOJN po duono da prezo.

MIA POEZIO

(Originale esperante verkita)

~ DE ~

Rafael de San Millán Alonso

ELDONITA

de

Hispana Esperanto Asocio

MADRIDO, 1932

Presejo: CHULILLA y ANGEL

Torrecilla del Leal, 17

FEDERACIÓN
ESPAÑOLA
DE ESPERANTO
HISPANA ESPERANTO-FEDERACIO



† Rafael de San Millán Alonso

BIOGRAFIA SKIZO DE L' POETO

Li naskiĝis en Madrido la 27an de Aprilo de 1866, kaj de sia infaneco li sin montris serioza, studema, modesta kaj alte idealema. Brile li sukcesis dum la tuta instruotempo, speciale de 1880 ĝis 1883, kiel lernanto en la Hospitalo de la Princino, Instituto de Ĥirurgia Terapeŭtiko. La 17an de Oktobro de 1889, li fariĝis Licenciato ĉe la Medicina Fakultato de Madrido, kaj por trafi la Doktorecon, je 1892, li prezentis originalan rimarkindan verkon «Fistuloj ĉe la ekstremo de la dika intesto», kiu doktorigis lin.

Entuziasmega admiranto de Cervantes kaj de niaj ĥlasikuloj, posedante inspiron, gvidate de homamo, li bonstile verkis hispane proze kaj verse, literature kaj science. Lia parolo estis flua kaj bela.

La scienca faĥo de la «Revista Ilustrada» (Ilustrita Revuo), 1885, entenas verkojn liajn; same la «Revista de Caza y Pesca» (Revuo pri Ĉasado kaj Fiŝkaptado), 1919, sed sub la pseŭdonimo Rafasan, versaĵojn, el kiuj estas mirindaj «El zagal melancólico» (La melanĥoliema paŝtisto) kaj «Mi serranilla» (Mia montaranino); sur la gazeto «Los Quijotes» (La Kiĥotoj), 1915, li aperigis verse kaj proze literaturaĵojn ankaŭ sub la dirita pseŭdonimo.

Okaze de solena festo je la tria jarcenta datreveno de la publiĝigo de «Don Kiĥoto», organizita de la Madrida Medicina Fakultato, la 9an de Majo de 1905, en la granda Amfiteatro de la Medicina Fakultato, li legis sian mirindan verĥon «Don Quijote, considerado como símbolo de la asociación del genio y de la locura» (Don Kiĥoto, konsiderata ĥiel simbolo de la ĥuniĝo de la genieco kaj frenezeco), ĥiun li antaŭe estis prezentinta en ĥonĥurso de la Medicina Kolegio de Madrido, kaj ĥiun ĉi tiu premiis.

Propagandajn esperantajn artikolojn hispane aperigis li sur «El Correo Español» (1910), sur «El Combate» (1919). Esperante li verkis por «Hispana Esperantisto» (1917-1923). Li aperigis «Tri Rakontoj kaj kelĥaj versaĵoj» kaj broŝureton enhavantan la poemojn «Sipopereo» kaj «La Iluzio kaj la Tempo».

Entuziasme vigle li laboradis ĉiel por Esperanto: li fondis ĥun aliaj samideanoj la Centran Madridan Grupon, ĥies prezidanto iam li estis; li helpis efike min por la fondo de la «Zamenhosa Federacio», ĥiu dum la teruraj jaroj de la mondmilito kaj postaj malfacilaj jaroj subtenis la sanktan fajron de l' esperantismo en nia lando ĥunigante la restintajn grupojn kaj izolajn samideanojn. Li ĉeestis multenombrajn Universalajn Kongresojn de Esperanto.

Li estis unu el fondintoj de la tre fama Instituto Rubio de Madrid; lin akceptis membro l' Antropologia Ateneo jam je Marto de 1886; li apartenis al la Ruĝa Kruco; kaj pro savanta ago lia, oni ordenis lin per la Bonfara Ordeno.

Bedaŭrinde li mortis je la 7a de Majo de 1924.

Vi estis talenta kuracisto, klera «Cervantes' emulo», poeto de la kastila kaj esperanta lingvoj; vi estis kavaliro el tre nobela deveno kaj riĉulo, kaj tamen vi estis modesta, humila, sindonema, bonkorega, perfekte demokrata, vidante reala nobelaro aŭ aristokrataro la sciularon; vi estis fidela disĉiplo de la Majstro, vera kaj firma internaideulo. Ni volas, do, honori vin, eldonante viajn poemojn, ĉar ni tiel ankaŭ honoras la landon en kiu vi naskiĝis, kiun vi kantis kaj kiun vi multe amis por scii ami tiujn de l' ceteraj homoj.

Jam mortis Rafael' de San Millán,
Poeto nobla plena je l' inspir',
Talanta grandanima kavaliro' !
Per plumo esprimadis lia man'.

La sentojn, kiuj fluis de fontan'
Tre milda, de la koro; lia dir'
Alloga ĉiam estis, kaj dezir'
Bonkora kontraŭ ĉia la tiran'...

Li estis inda je plej bona sort',
Ĉar estis tre sindona lia sent'
Al ĉio kaj al ĉiuj; kaj la fort'
De tiu sento estis fundament'
Por lia la konduto ĝis la mort':
Nek estis por malbon' al li moment' !



De lingv' Esperanto per belo
Vi verkis; mirinde kantinte
Laŭ versoj tre plenaj je helo

Verkitaĵ de kvaŝaŭ anĝelo
Al tero memvole veninte.
Ni iris Kongresojn; ĝojante
Sur sama la vojo al celo;
Ni ĉiam laboris, konstante,
Ĝis Morto vin tiris—triumfante
Por nia bedaŭr'—el terŝelo.

Dumvive, animaj suferoj
Ne trafis estingi la flamon
Ĉe via la brusto, nek amon,
La vian, suŝoki mizeroj.
Vi havis animan balzamon
Ĉe l' mezo de teraj inferoj,
«La Kantojn al Belaj Esperoj»!
Kaj certe vi havos la famon,
Ĉar ema vi estis al Veroj
Kaj ĉiam vi celis Fratamon!

JULIO MANGADA ROSENÖRN

Ŝ I P O P E R E O

Forkuru malĝojiga rememoro
de malproksima jam juneco mia ;
ripozu mia dolorata koro !
Sed ne, ĉar restas kun doloro tia
la sola rememoro poezia !

Ĝi estas rememor' pri idilio,
pri mia sola granda iluzio,
belega forkurinta realeco !
La idili' fariĝis elegio
kaj maljunigis min en la juneco.

Min vundas kial rememor' kruele ?
Vi kial montras vin sufer' interna ?
Mi kial min turmentas mem sencele ?
Ha ! Tiam brilis la feliĉo hele,
kaj al mi ŝajnis estos ĝi eterna.

Animon mian feliĉigis amo,
sed la plej pura, ĉasta, la plej forta,
kaj la plej arda kaj pasia flamo.
Sed ve al mi, malgaja, malbonsorta !
Finiĝis tio per terura dramo !

En la naiva aĝo, kiam vivo
trankvile kuras tra la vojo plata
kaj antaŭ tre feliĉa perspektivo,
min amis virineto delikata ;
freneze ŝi de mia kor' amata.

En mondo la plej bela kaj pasia
inspir' ŝi estis mia, mia stelo ;
beleco ŝia estis vere dia.
Si certe sidas nun en la ĉielo :
virin' do, ne ŝi estis, sed anĝelo.

Mi trovis ŝin en land' intertropika,
ĉe kiu estas rava la kamparo,
ĉe kiu kreskas kreskaĵar' fortika
eĉ en la plej malmola ŝton' silika
kaj apud blua kaj pentrinda maro.

Kaj inter la arbaro kaj haveno,
troviĝis apud maro riĉbieno,
kaj meze brilis pro bongusta stilo
palaco kun majesta peristilo
tre bele ĉirkaŭita de ĝardeno.

Si estis tie superega floro,
mi tie konis ŝin, kaj mia koro
sen ia kontraŭstaro nek turmento
feliĉe tie tremis pro amsento ;
min amis tie mia la trezoro !

Mi vere rememoras kun admiro,
samtempe kiel niaj koroj batis ;
respondis la sopiro al sopiro ;
ĉu tion ŝatis mi, ŝi samon ŝatis ;
ordon' al ŝi ja mia la deziro !

Koregaj, ĉarmaj, tre pasiaj scenoj
kaj interparoladoj ne sekretaj
ĉe l' foliaro — dolĉaj la kunvenoj !—
en la ĝarden' okazis en matenoj
printempaj kaj agrable malvarmetaj.

Mi, obeante mian korinklinon,
vizitis ame ĉiutage tiam
infanan preskaŭ mian fianĉinon ;
ŝi min atendis post la pordo ĉiam,
montrante sur la vang' ruĝiĝkarminon.

Kaj kiam, galopinte sur ĉevalo,
mi ĉiutage de proksima valo
ekvidis de l' ĝarden' la blankan muron,
ekvidis tra kreskaĵa la vualo
post krada pord' anĝelan la figuron.

Tre blanka, kiel blanka ŝton' marmora
ŝi estis, paca kiel klara luno,
kaj ŝia bela kap' blondorkolora
fortege brilis kiel krono glora
majesta sub radioj de la suno.

Kaj kiam apud la virino bela
plezure mi forsaltis de la selo
de ŝia la okul', palblua stelo,
el la feliĉ' eterna kaj ĉiela,
al mi tuj venis lumradio hela.

Ĉu bona, ĉu malbona la vetero,
ŝi min atendis ĉiam, kaj bonkora,
naive gaja, dolĉe bonhumora,
ĝentile per pasia maniero
salutis min per voĉo belsonora.

Alvenon mian per ridet' ŝi festis
kaj regis la gajec' dum ni kunestis
—gajec' de l' juna karakter' konfida—,
tre longan tempon apud ŝi mi restis,
sed ju pli dolĉa temp', des pli rapida.

Forflugis kiel vento hor' post horo,
neniam ŝi kaj mi eĉ konis tedon,
ĉar kvazaŭ estis nia am' adoro ;
en ŝia man' progresis artlaboro,
dum faris mi por ŝi la florbukedon.

Ni, konfidemaj, ĝuis estantecon :
kreskaĵajn bonodorojn tre balzamajn,
ĉielon bluan, sunradiojn flamajn,
junecon, plenan sanon kaj gajecon,
rigardojn amajn kaj parolojn amajn !

Ŝi, ne kaŝante sian aman senton
montrante al mi grandan la atenton,
senĉese, por min zorgi, estis preta ;
kaj se mi estis iom malsaneta,
vizaĝo ŝia montris malkontenton.

Kaj fojon, dum mi faris la kolekton
el floroj por buked', ne atendite
ektuŝis mi per fingro ve ! insekton,
de mia zorgo kaj lerteco spite,
ĝi pikis min kaj flugis for subite.

Ho !, kia malĝojeco, kia tremo
en ŝi vidiĝis — pruvoj de korpremo —
briligis kia ploro ŝian vangon,
kun kia maldolĉec', kun kia ĝemo,
rigardis la knabinon mian sangon.

Kaj plena je malkvietec' animo,
ŝi rigardadis min kun granda timo,
el ŝia buŝ' eliris frazoj molaj ;
feliĉe al ŝi estis tre konsolaj
la gaja rido mia kaj l' esprimo.

Feliĉa temp' ! Ni pensis, ke neniam
de tia la feliĉo estos fino ;
kaj dum, minacis nin l' Antaŭdestino !
Alproksimiĝis jam la tempo kiam
l' anĝel' fariĝos mia la edzino !

Jam la edziĝo la sekvontan jaron
kunigos sankte nian dolĉan paron.
Fatalo trudis mian la foreston ;
mi devis pro aferoj krozi maron,
kaj por pretigi nian aman neston.

Por kio la feliĉon mi atingis
se poste mi elportas la suferon,
se kontraŭ mi Fatalo glavon svingis?
Ve! Perdi apud la ĉiel' esperon
kaj fali kun la rememor' sur teron !

Mi tiam adiaŭis ŝin ; nevole
ja preskaŭ mi ekploris. Senparole,
kun antaŭsent' malgaja ĉe la koro,
mi l' anĝeleton kisis tre konsole,
kaj mi foriris plena je doloro.

Feliĉe Hispanujon mi alvenis
kaj tre aktive kaj fervore penis
tuj solvi ĉiujn miajn la aferojn,
ĉar de l' forest' mi sentis la suferojn,
kaj kiuj ja senĉese min ĉagrenis.

Mi ne forlasis eĉ malgravajn perojn,
puŝate de fervoro kaj aktivo,
kaj iom nur dolĉiĝis mia vivo
legante ŝiajn amajn la leterojn ;
pasie mi kisadis la paperojn.

Mi ĉion aranĝinte, kun plezuro,
deziris al ŝi flugi kiel vento,
vojaĝi per rapida marveturo,
ĉar ŝajnis jam al mi kvazaŭ jarcento
ĉu horo, ĉu minuto kaj momento.

Noktiĝis kiam jam la mara ondo
ŝanceliĝis la majestan ŝipon belan,
per kiu mi vojaĝis; lumon stelan
ĉielo disvastigis tra la Mondo,
lumeto estis de la mar' respondo.

Kaj kial time preĝis mi al Dio
kaj sentis malĝojigan antaŭsenton?
Kaj kial mi streĉegis la atenton,
kaj kun tre maltrankvila emocio
rigardis la kvietan okcidenton?

Ho! Nokton, la ventego tre subita,
portante kun si la fulmotondraron,
ondigis forte la timigan maron;
eĉ la ferdekon ŝaŭmo disĵetita
atingis, ne trovinte taŭgan baron.

La fulm' blindigis pro la lumo brila,
kaj kvazaŭ brulis mia tru' pupila,
postregis tuj mallumo absoluta;
bruege furiozis maro tuta,
kaj mia koro batis maltrankvila.

Subite mi ekvidis ŝipan flankon
kaj antaŭ mia ŝip; jen granda bruo
kaj krako de rompiĝo kaj detruo.
Falegis mi tuj nepre sur la plankon
pro la terura forto de la skuo.

Ŝipeg' alia estis do frapita
de mia ŝipo; ĝia flank' rompita,
la maro ĝin eniris tra la fendo,
kaj al ni kun la vent' alvenis plendo
kaj krio, peto kun dolor' ĵetita.

Ne mia ŝip' rompiĝis, ĝi fiere
de l' maro kontraŭstaris fortajn batojn;
l' alia pereadis senespere
venkite tute de la ond' kolere.
Maristoj niaj ĵetis la boatojn.

Por savi malfeliĉajn pereontojn
mi saltis en boaton ekstremante;
kuraĝe la timigajn akvajn montojn
atakis la boat' ŝanceliĝante,
dum la nubeg' verŝegis siajn fontojn.

Muĝegis vent' frapante kvazaŭ vipo
kaj ĵus ekbrilis la rompita ŝipo
kronate de tre densa nigra fumo...
Ho, ve! Sur ŝaŭm' aperis je ruĝlumo
l' anĝelo mia ĉe flosanta ŝtipo.

Ekmirigate tiam de l' apero,
ĉu realaĵ' ?—mi pensis—ĉu malvero?
terure pala estis ŝia vango,
kriadis ŝi kun granda malespero,
kaj ŝian blankan frunton trempis sango.

Tremante mi pro la terura sceno
atentis ne konsilon kaj admonon,
en maron saltis mi, kun granda peno
naĝadis ; al ŝi mian voĉan sonon :
mi trafis al mi ŝian la rekonon.

«Esperu ! Jen mi !» Tiam ve ! lignaro
eksplode estis el la fajr' ĵetata,
kaj malaperis de l' supraĵ' de l' maro
la malfortika korpo delikata,
de multepeza maso brutfrapata.

Ho, teruraĵo, de l' feliĉ' ruino,
de mia sola iluzio fino !
Ho, la korpeto delikata, bela,
la juna korp' de mia fianĉino
perdita restos en la fund' malhela !

Premate, malfeliĉa koro mia
ribele plendis je la volo Dia ;
sed mi tuj, ricevinte fortan frapon
danĝere ja vundantan mian kapon,
senmova restis, tute senkonscia.

Pro kio, ame, oni min forprenis
tuj, kiam mi pro la frapego svenis,
kaj zorge metis min sur la ferdekon?
Ha! Devas mi konfesi gravan pekon:
metinton tute kore mi malbenis.

Kun plendo, kaj kun ĝemo kaj sopiro,
pripensis mi—jam ĉesis la deliro—
de ŝia marvetur' pri la kialo;
—mi pensis—la Fatalo, la Fatalo!
Min igis la Fatal' de l' am' martiro!

Postulis kuraciston tute spertan
malsano grava de l' patrino ŝia
por trafi nepre la sukceson certan,
per urĝa kuracado ĥirurgia.
Jen la kialo de l' vojaĝ' ilia.

Por kio scii tion?... Malfeliĉe
la kaŭzo estis la malbona sorto,
min sorto suferigis, ve, sufiĉe!
Al mi jam venu ripoziga morto
ĉar en la kor' al mi ne restas forto!

Ho, katastrof'! Ĝi vundis min akute;
ĝi de l' eterna malĝojec' motivo.
Tutsame, kiel ŝip' frapita brute,
feliĉo mia malaperis tute
en la maldolĉa maro de la vivo.

Sed l' anĝelete al Eŝtaj' Supera
ja petos, ke mi, nun tre senespera,
forlasu jam la vivon neutilan,
por ĝui kun ŝi belan Regnon brilan
en la eterna vivo, sole vera !

LA ILUZIO KAJ LA TEMPO

Freŝa, paca, naiva kaj alloga,
bela, gaja kaj sana, la knabino,
ĉirkaŭite de klara, verda lumo...
Kio estas al ŝi l' Antaŭdestino?

Ludas ŝi en ĝardeno flora, bela,
kie regas senĉese la Printempo ;
nek sufer' kaj bezon' al ŝi anoncas
la rapidan kuradon de la Tempo.

Ŝi pri la maljunec' neniam pensis ;
ŝi ne scias pri timo kaj doloro ;
ŝi nek ĝemis, nek plendis, kaj neniam
malsekigis okulojn ŝiajn ploro.

Scias ŝi pri boneco kaj feliĉo,
kaj ŝi oron promesas, povon, amon,
sanon, longan vivadon, trankvilecon,
dum la viv', kaj postmorte la ĝlorfamom.

Sin adoras la Homo, la diinon ;
al ŝi rekte li marŝas kun espero,
ĉar promesas ŝi, kaj la Homo pensas :
«Tio, kion ŝi diras, estas vero.»

Homo marŝas jes, tamen Iluzio
marŝas ja pli rapide, kaj per gesto
montras senton al Homo, simpatian,
plaĉi al ŝi ilia la ĉeesto.

Ĉu tra bela florar' antaŭeniras,
ĉu sur roka krutaĵo l' Iluzio ;
ofte la interspacon ŝi pliigas,
kaj ŝin sekvas la Hom' kun emocio.

Ĉe l' komenco unue de la vojo,
tre konfida la Homo kaj malsperta
pensas, ke li facile ŝin atingos,
kaj pri sia sukceso esti certa.

Poste dubas li, l' Iluzi' ŝancelas
pri plej taŭga la voj' kaj pri la celo ;
suno iom post iom mallumiĝas,
kaj kovriĝas per nuboj la ĉielo.

Kaj la arboj nudiĝas, vento blovas,
regas nokto, malvarmo kaj la timo ;
jam ne povas plu Iluzio marŝi ;
de la vojo de l' Iluzi' jen limo.

Iluzio paliĝas, tremas, haltas ;
maljunulo, ho ! ; jen kun ilo fera...
Li, la Tempo, armite per falĉilo,
iras ŝin kun vizaĝo tre severa.

Levas la maljunulo la falĉilon,
kvazaŭ fulmo brilegas l' akra fero,
post momentoj la Iluzi' trafita
restas sange trempite sur la tero.

Tiam Homo, ve !, antaŭ korp' amita
traborita, palega kaj malvarma,
diras al la terura maljunulo :
«Estis sole ŝi mia revo ĉarma !»

«Mi plu sen Iluzi' ne volas marŝi ;
frapu min, maljunul', jen mia kapo.»
Tempo : «Kiam mi volos kaj difinos
nepre ja vin atingos mia frapo !»

LA AGLO KAJ LA AEROPLANO

Sur alta ŝtonego la aglo potenca
pripensas kun granda fiero :
«Mi estas sendube el ĉiuj estaĵoj
la reĝo nur de l' atmosfero.

Mi flugas rapide, mi flugas libere
kaj super plej altaj montaroj ;
de l' voj' tra l' acro kaj same tra l' nuboj
ne staras al mi do la baroj.

Kaj certe neniam mi trovos rivalon,
mi estas feliĉa, bonsorta ;
mi estas l' estaĵo ĉe tuta la mondo
plej alten fluganta kaj forta.

Malsupre la Homo la Mondon regadas,
li havas la maron kaj teron ;
sed li, malfeliĉa, ne havas flugilojn :
neniam li regos l' aeron !»

. Potencajn flugilojn etendas ĝi, bele,
kun granda majesta trankvilo,
ekflugas serĉante ĉasajon bongustan
per sia l' akuta pupilo.

Subite ĝi aŭdas tre grandan ekbruon
kaj vidas ĉe la horizonto
grandegan birdegon kun grandaj flugiloj
flugantan kaj super de monto.

La aglo rapidas al nova birdego,
simila je monstro himera,
alvenas proksimen, kaj blinde, kuraĝe
atakas la aglo kolera.

Fulmeto briletas, kaj bruas tondreto
de l' monstro fluganta ĵetite ;
vundite dolore, rapide la aglo
forflugas, de timo kaptite ;

kaj tuj ĝi murmuras : «Ne monstro, ĝi estas,
ĝi estas ja homo fluganta ;
mi kontraŭ li povos neniam batali,
li estas konstante venkanta.»

Gi venas en neston, kaj aglo maljuna
ĝin diras : «Malsaĝa ! Ja dia
la Homon ci vidu, kaj ĉion li povas,
planedo nun estas, do, lia !»

MALAMIKA AMIKINO

Laŭ via diro, bela sinjorino
vi estas mia amikin' sincera ;
sed min vi suferigas senkomplete
kruele, per sufero senespera.

Ĉu povas esti du kontraŭaj sentoj ?
Ĉu via Brust' enhavas koron tian...,
ke povas ĝi samtempe plene ami
kaj ankaŭ senti eĉ malamon ian ?

Ordonas vi al mi, ke mi estingu
ĉe mia koro la brulantan flamon.
Mi tion ne atingos ; mi ne povos
en mia brust' mortigi mian amon.

Ha, vidi feliĉegon deziratan !...
Deteni perfortege mian senton !...
Sed ĉu mi devas mian tutan vivon
suferi de Tantalo la turmenton ?

Mi estas vir' amanta kaj pasia,
kaj vin mi amos jam ĝis mia fino ;
regulan haltigilon mi ne havas,
ne mi senviva blinda la maŝino.

Do, tute mi ne povas min direkti,
nek sentojn nun elekti, nek la emojn,
ĉar tiam, mi, feliĉe, ne elportus
dolorojn tiel grandajn kaj korprenojn.

Nin granda la distanco apartigas,
kaj estas pri la kred' kaj land' malsamo ;
sed ĉiujn barojn tute disfalis
grandega la potenco de la amo.

Min amu ne ŝparante vian senton,
senlime tute amu, Sinjorino !,
animo via estu kompatema
en brusto havu koron vi, feino !

MALBONA SONGŬO

Mi estis gaje ĉe kamparo luma,
ornamis ĝin abundaj belaj floroj,
kaj apud virga la arbar' malluma.

Leviĝis de l' floraro la odoroj,
venteto blovis tute parfumriĉa
ĝojigis min diversaj la koloroj.

Ne tro da varmo estis, sed sufiĉa ;
sen timo promenante kaj sen baro
mi trovis min kontenta kaj feliĉa.

Subite venis en min de l' arbaro
bruetoj tute dolĉaj kaj similaj
je tiuj de l' ondetoj de la maro.

La foliaro kaj la floroj brilaj
bruiĝis tiel milde pro l' alveno
de bestoj tre diversaj sed trankvilaj.

Ridetis ili kvazaŭ kun mieno
afabla kaj amika ŝajne vera,
kaj same la liono kaj azeno,

eĉ am' ilia por mi tre sincera ;
kaj ili min invitis tre ĝentile
promeni kune tra l' arbar' mistera :

parolis ili simple kaj humile,
kaj estis mi naiva kaj kredema ;
konsentis mi tutkore kaj facile.

Ilia gaja ĝentilec' ekstrema
tuj logis tiel mian la atenton,
ke ne timigis min la vent' korprema,

kaj mi ne sentis malagrablan senton,
kaj mi ne timis la misteran lokon,
kaj mia kor' ne sentis malkontenton ;

kaj mi ne vidis la sarkasman mokon
de la bestaro, kiu tre minace
kun multaj pli, jam obeante vokon,

al mi sin turnis brave kaj malpace.
Mi, poste, jam ektimis kaj silentis
ĉar la bestar' ne marŝis tute pace.

Mi la ĝemadon de la vento sentis,
al mi l' arbaro ŝajnis tre danĝera
kaj mi pro mia kredemeco pentis.

Min malestimis la bestar' fiera ;
grandega bruo estis kaj tertremo
kaj mi min trovis tute senespera.

El mia Brust' eliris tiam ĝemo ;
tuj tuta la bestar' min atakegis
kaj min sendefendigis la korpremo.

Instinktoj, nur la bestaj, ilin regis.
Bestaro, ve, terura, malbenita!
Pro frapoj kaj mordegoj mi falegis.

Kaj restis mia korp' dispecigita.
El mia karno manĝis ĉiu besto!...
Ho, ve! El mia karno sangtrempita!

Tre baldaŭ nur jam restis ia resto,
sed tiam malpliiĝis la mallumo:
vestite ha! de cindrogriza vesto,

flugante ĉu sur nubo ĉu sur fumo,
aperis ĉe l' arbaro ninfo bela;
ĉirkaŭis ŝin tutplene pala lumo

verdblua, kiel estas lumo stela.
Si dolĉe min rigardis kun kompatato
kaj iom lum' fariĝis bele hela.

Si diris al mi: «Ho, malgaja frato,
vin venkis tre sovaĝaj bestoj tiaj
puŝite de bruteco kaj malŝato;

la bestoj estas samtempanoj viaj
loĝante en ĉi tiu la dezerto,
eĉ manĝas ili karnon de l' aliaj;

l'arbaro estas Mond', kaj mi la Sperto.
Ha! Estis vi naiva kaj sensperta,
kaj tro malfrua estas, do, l' averto.»

Vekiĝis mi kaj pensis : «estas certa
la parolad' malgaja de l' apero,
ĉar estis mi naiva kaj mallerta.

*Mi songis tion, kio estas vero,
kaj ĉar la song' prezentis mian sorton,
al mi jam, kio restas sen espero?
Atendi, al mi restas, mian morton!»*

ZAMENHOF MORTIS!

Tre amis via la spirit' Homaron,
por ĉiuj estis frata via koro,
deziroj viaj estis am', honoro,
al kiuj vi aldonis gloran faron.

Timante ne la montojn kaj la maron,
flugadis brile ĉien via gloro,
kaj ĉie restos via rememoro,
ĉar homoj jam ĝin metos sur altaron.

Nun tra la Mondo kuras sanga fluo,
nun ploras via «*familia rondo*»,
Planedo tremas pro pafada skuo ;

la ŝipo brulas sur la mara ondo !...
Dum regas la malamo kaj detruo,
vi jam ne povas resti en la Mondo !

LA STELO DE LA ESPERO

Ho! Ĉe ci, Societo, de la fondo,
bruego estas ĉie, krio, bato ;
sed estas nek indulgo, nek kompato :
eterna batalkampoj estas Mondo.

La pafoj estas, al la paf', respondo ;
ricevos mortoj de la frat' la frato ;
de l' sango makulita estas strato
kaj la kamparo, eĉ la mara ondo.

Jam estas, tamen klara verda lumo,
ĝi nigra mallumecon tute ŝiras,
feliĉon ĝi promesas al la Tero ;

Jam malpliigis batalbru' kaj fumo.
Rigardis Homoj alten kaj sopiras :
Aperis ĵus la Stel' de la Espero !

K I O R E G A S ?

Belan frumatenton dolĉan,
en ĉarma ĝardeno,
mi trankvile pripensadas
pri dia la beno...

La ĉiel' montriĝas blua
tra la foliaro,
freŝa la ventet' alvenas,
ĝi kvazaŭ de l' maro.

Inter floroj kaj folioj,
tra l' verda la reto,
saltas birdoj, dum aliaj
ĉe la rivereto.

Ili kanton, do, aŭskultas
de siaj amantoj,
ili same jam respondas
per siaj la kantoj.

Dian benon ja ricevis
feliĉa la Mondo,
en la monto, en kamparo,
en mara la ondo!

Sed ĉu en la Mondo tuta
nur estas trankvilo?
Ve!, nun en aliaj landoj
bruiĝas armilo.

Ĉar jam en iliaj kampoj,
malbena de l' sorto!,
la malamo kaj detruo
plenregas, eĉ Morto!

Ĉu nun regas ĉe la Tero
nur fero kaj flamo?
Ne, ĉi tie regas vivo,
jes, vivo kaj amo!

F O R G E S U · Ĉ I O N

Mi pripensas pri l' Mondo terura,
forlasita de l' zorgo de l' Dio,
pri la nuna tutmonda sangado;
malaminda vi, nun, Historio!

Mi pripensas pri mia Patrujo;
sangellasas ĝi ankaŭ kaj ploras,
ĝian bravan kaj puran la koron
oni nun tre fortege doloras,

ĉar ĉe ni la malam' nin nun regas
baldaŭ estos batalo de fratoj,
jam ne estas brakpremoj kaj kisoj,
jam nur estas insultoj kaj batoj.

Nur vi bela kaj dolĉa virino,
apud mi kaj en paco kaj solo,
vi, anĝelo pasie amanta,
estas mia feliĉ' kaj konsolo.

Sed mi vidas nur vin tro rapide
ĉar forflugas la temp' mallongeta
kaj ni kaŝe sopiras kaj amas,
estas nia la amo sekreta!

Pli ol tuta Homar' vi valoras,
kaj mi ĝojas aŭdante vin diri:
«Vi forgesu la Mondon kaj ĉion;
mi deziras por vi nur sopiri!»

CIO ESTAS MALVARMA

Ĉielo nuba estas malvarma,
malvarma vento, tero kaj maro;
glacio kuŝas jam sur tegmento,
glacio kuŝas sur trotuaro.

Kreskaĵo, ŝtonoj, homaj la korpoj
kaj tuta norda la duonsfero,
animoj, estas same malvarmaj,
ĉar ĉie regas la senespero.

La neĝo falas, mortas Naturo,
jam eĉ forflugis birdoj migrantaj,
jam mi ne vidas verdajn foliojn,
kaj eĉ silentas birdoj kantantaj.

Forflugis, kiel mia juneco,
ci ankaŭ tiel, bela sezono ;
mi perdis mian tutan feliĉon ;
forkuris de la Mondo la Bono !

Glaci' haltigas la rivereton,
kaj l' arbaretoj estas ne ĉarmaj ;
jam eĉ la homaj interrilatoj
pli kaj pli estas froste malvarmaj...

Ankoraŭ, tamen restas varmego,
ĉar mia kor' enhavas la flamon,
ja mia brusto brulas interne
ĉar mia kor' enhavas tro amon !

RABITA FLORETO

En verda kampo, paŝtisto
vidis belan floron ;
ĝi emocie batigis
ame lian koron.

Li restis al la floreto
tuj enamiĝinta,
kaj al ĝi, do, apartenis
koro flamiĝinta.

Li en ĝin akvon surverŝis,
ame zorgis ĝin,
kaj ĝi pli iom post iom
enamigis lin.

Li ne kuraĝis eĉ tuŝi
ĝin per sia mano,
kaj ĉiutage li zorgis
jam pri ĝia sano.

Sed tien, tagon alvenis
bela la ĉasisto,
tre juna kaj eleganta
birdomortigisto.

Paŝtisto sentis envion
kvankam ne malamon ;
ne pensis li ke ĉasisto
ĉasos lian amon.

Sed baldaŭ indiferenta,
plena en trankvilo,
ĉasisto ekforveturis
per aŭtomobilo.

Paŝtisto tute ja miris
pro l' motora bruo ;
ĉasisto portis la floron
en la butontruo.

Paŝtisto tiam kriegis :
«Se vi havas oron,
do, kial al mi vi ŝtelas
mian la trezoron?!»

La floron iam belkintan
ĵetis la ĉasisto ;
dum pro malĝojo konstanta
mortis la paŝtisto.

Konsciu, amoĉasisto,
fidu ne je l' sorto,
amuzo via ja estas
por alia morto ;

kaj pensu bone, ke kiam
estas vi trankvila
vi povas esti punata
de la pun' simila.

EN LA ĜARDENO DE LA VIVO...

En la granda ĝardeno de la vivo
troviĝis bela floro,
mi ĝin volus elpreni, kaj kunporti
ĝin apud mia koro.

Kiam mi ĝin rigardis, ĝi kliniĝis
ameme tuj al mi.
Ha, floreto tre bela kaj tre juna
malgaja ŝajnas vi!

Ĉar vi ĵus malfermiĝis, longe ĝuos
vi tian la edenon ;
sed mi baldaŭ, kredeble kaj ne vole,
forlasos la ĝardenon.

Tial mi ne kuraĝos vin eltiri,
vin rabi al l' arbeto ;
ĉar ve! nepre al ĉiu ,do, altrudas
Fatala la Dekreto.

Tamen kiam pordegon de l' ĝardeno
trapasos mi por ĉiam,
pri mi, bela floreto!, rememoru,
kaj pri mi pensu iam.

Kaj se sentus vi tian saman senton
do, kian mia koro,
estu guto de l' roso dolĉa larmo
de via rememoro.

Ĉ E S E V I L L A

(SEGIDILJOJ) (1)

Mi vidis vin ; vi dancis
en la Foiro.

El mia kor' eliris
dolĉa sopiro.

Kia korpeto !

Ha, mia kara bela
brunulineto !

Kaj same kiel suno
varma kaj hela,

radias la vizaĝo
ĉarma kaj bela

Beno de Dio !

Vi dancas kiel flugas
la papilio !

Ravantaj viaj belo
kaj simpatio,

min igas jam kaptito,
do, de l' Amdio ;

lia la reto

min faris sklavo via,
brunulineto !

(1) Kanto kaj danco de Andaluzio.

TIMU! . . .

Ne, ja, timu la bestojn sovaĝajn
kaj vivadu en plena trankvilo,
kontraŭ ili vi havas la forton,
kiu estas la bona pafilo.

Ne, ja, timu la Sorton kontraŭan,
estas kontraŭ ĝi la pacienco ;
nek la fortojn plej povajn de l' Mondo,
ĉar nun estas potenca Scienco.

Ne, ja, timu kruelajn malsanojn
kaj batalon de l' viv' ĝis la fino ;
kontraŭ ili potencon vi havas,
estas pova nun la Medicino.

Sed, ve!, timu singarde la homon,
lian oftan perfidan agadon ;
timu, timu do, la similulon,
eĉ l' amikon kaj la kamaradon !

RESANIĜU, HO, TERO!

Kiel poste la plej grava malsano,
tiu, kiu preskaŭ vidis la morton,
malrapide reakiras la forton
kiu estas la heroldo de l' sano ;

de l' pafilo disrompita la ĉano
forgesinte kun trudemo perforton,
la Homar' de Di' ricevis la Sorton
purigita jam sangruĝa la mano.

Sed pro homfrenezo kaj anarkio
nun ankoraŭ restas bat' kaj malamo,
de l' batal' ankoraŭ sonas la krio,

de l' brulad' ankoraŭ brilas la flamo...
Kiam sur la Ter' jam regos, ve Dio!,
ordo, paco, la justeco kaj amo?!

HO TEMPO, NE RAPIDU!

Same kiel rapida vagonaro
lasas post si la valon kaj la monton,
kuras tra la tunelo kaj kamparo

kaj trapasas fortegan altan ponton
kaj glitante sur brila vojo fera
iras en malproksiman horizonton ;

tute same majesta kaj fiera
puŝas ĉiam la vivon kaj la Teron
vi, ho Temp' malindulga kaj severa ;

ĝi atentas deziron nek esperon,
ĝi estingas eĉ de la suno lumon
kaj kurigas ja ĉian astran sferon.

Same, kiel forblovas vento fumon,
vi al koro pasia rabas amon,
al la floro forrabas la parfumon ;

tute sola vi verkas homan dramon,
vi mortigas la penson kaj pasion,
ne respektas eĉ vanton kaj glorfamon.

Kaj detruas jam ĉian iluzion
la forgeso, viulo tre fidela...
Ĉu vi ambaŭ obeas ankaŭ Dion ?

Ho vi, Tempo, terura kaj kruela !
donas de l' maljuneco la turmentojn
al virino, anĝelo iam bela ;

Vi renversas antikvajn monumentojn,
turojn, ankaŭ arkadojn kaj kolonojn,
senkompate puŝante la jarcentojn ;

vi polvigas granitajn grandajn ŝtonojn,
vi, ŝanĝante kaprice homajn sentojn,
fondas, fondas, naciojn kaj la tronojn.

Tute same epokojn tre subtile
vi pasigas per via blinda forto
kiel rokojn detruas pulv' facile.

Vin nenio, do, venkas, nek la Sorto!
Maljunul', vi timiga estas vere.
Ne rapidu ; ĉar kun vi venas Morto
kaj mi vidas ĝin tute senespere !

V A N T E C O

Vi sidas sur nenia fundamento,
vi, nur memvola ŝajno de merito,
ĉar estas ne grandeco sed imito,
vaporu, nub', nebulo, fumo, vento !

Malbona kaj perfida ĉia tento
helpanto via estas, eĉ incito
sentata ja senĉese de l' spirito
regata de l' envi', ne de talento.

Prosperas vi per flato kaj favoro,
per malhonoro, trompo kaj malvero ;
vi estas koto kun la mask' el oro ;

Justecon vi forigis de la Tero ;
naŭziga vi, makulo de la Gloro !
Vi certe, nepre, venis de l' infero !

K A N T A Ĵ O

Ĉu jam eble ŝi konas mian amon,
kiun gardas interne mia koro?
Mia grandega ploro
ne atingos estingi ĝian flamon!
Kaŝite devas resti la sufero;
kaŝite, la doloro;
kaŝite, la pasio sen espero.

Mia koro, do, devas resti muta
kaj suferi doloron ĝis la morto;
tion jam volis Sorto:
apartigas nin granda baro kruta.
Se sciis ŝi, ke trudas la silenton
nesuperebla forto,
ke mi ne devas diri mian senton...

Se venkite ha! de la plor' la baro
falus, rulus, do, en alian lokon
same, ve! kiel rokon
jam faligas gutetoj de la maro!
Sed revas mi; ne estas ebla tio.
Ne aŭdos mian vokon,
pro trudo de la Sorto, Amodio!

Kiam mi ŝin ekvidas en la strato,
ankaŭ brili okuloj ŝiaj belaj,
kiel la steloj helaj,
rapidigas la koron milda bato
Momenta la feliĉo! Poste restas
ĉe mia kor' kruelaj
doloroj, ĉar ŝi de mi tuj forestas!

Kontraŭ leĝoj nun de la Societo
ĉe mi staras potence fort' natura,
nepre ĝi, tre terura,
al ŝi puŝas min—feron al magneto!—
Ja estas la natura fort' ribelo,
ĉar mia koro pura
meritas ne la punon de l' ĉielo.

Kuru la belulino tra la vivo!
Estu ŝia vojaĝ' feliĉo plena
kaj kun ĉiel' serena;
supren ŝi, mi malsupren sur deklivo
ĉe viv' alia, sur la vojo flora,
tre bela, tutebena,
kunigos eble nin la sort' favora.

Kantoj flugu rapide tra l' aero
kaj tuj diru al l' anĝelete mia:
«Ĉio, kion li kantis, estas vero.»
Malgraŭ, ke mi ne povas esti ŝia,
vi raportu pri mia kor' pasia.

JIMENEZ LOIRA! SORIANO!

Iliaj agoj eterne vivos post ili.

Trapasante, ĉiela meteoro
lasas ĉe la grizblua atmosfero
la postsignon, brilantan en l' aero
kvazaŭ belaj fadenoj el la oro.

Ĉu nur restas post ĝi la rememoro?
Ne, ĉar de la ĉielo, er' post ero,
falas, sur la supraĵon de la Tero,
ĝia, fojojn, tre riĉa la pulvoro.

La karuloj simile jam trapasis.
Ili lasis sub niaj verdaj flagoj
aĵ ni famojn iliajn; vidu brili...

Sed praktike, ĉu ion ili lasis?
Ne malmulte, jes, ĉar iliaj agoj
ĉiam staros firmege ja post ili!

LA DEKA... LA DEKDUA

Alvokite de l' amo, multaj homoj bonkoraj,
el ĉiu nacieco, el ĉiu seks' kaj aĝo,
al urbego alkuris—urb' el la plej valoraj,
de Francuj' la vizaĝo.—

Ilin puŝis ne tute scivolemo nur sola,
persona la profito, negoc' nek monafero ;
ili estis puŝataj de la sento bonvola
preta por memofero.

Kelkajn fojojn kunigis ilin sento la sama,
ĝuante la fratecon regantan ĉe l' ĉielo,
kun agrabla ĉeesto de la Majstro glorfama :
sed hodiaŭ... kruelo !

Plor' hodiaŭ ! Kruelo ! Li forlasis la Mondon !
Ĉu ankaŭ Esperanto ? Neniu nin forlasis.
Regas lia spirito lian karan la rondon !
Ne batal' nin frakasis !

Post aliaj Kongresoj ĉiam la kongresanoj
disiĝis kun amikaj kaj grandaj ĝoj' kaj fido,
kaj ekkriis, dum frate kunplektiĝis la manoj :
«Sanon kaj ĝis revido !»

Sed... la Dekan, jen : kiel kolombo trankvila
disiĝas, pro ĉasista la pafo, tra l' aero ;
kongresanojn disigis la bruego pafila
plenajn je malespero !

Multaj homoj ekkriis : «Ve, Kongres' malbon-
[sorta !
Mortigos Esperanton kanonoj tre kruelaj !...»
Sed ĝi, kvazaŭ Fenikso, renaskiĝas senmorta
el la cindroj malhelaj !

Kaj jen, apud ruinoj, kie flugis ne fumo,
en nova la Kongreso, kaj kvazaŭ pacreganto,
restariĝas lumiga per tre hela verdumo...
Venkis Li! ESPERANTO!

ŜI FORGESITA

Kial sentis mi grandaŭ scivolemon
kaj deziris la tutan Mondon koni?
Pri la longo de l' vojo mi ne sciis;
mi ne sciis, ke estas ĝi laciga!
Mi petadis gvidiston, kaj mi trafis,
ĉar demono aŭskultis mian vokon.
Kiel gaja, ha, estis la komenco!
Kia la facileco! Mi marŝadis!...
Kion mi rigardadis kaj mi vidis?
Sed mi ĉion ne tute rememoras
Marojn, montojn, mi vidis, eĉ kamparojn,
urbojn kaj la urbetojn kaj vilaĝojn,
la palacojn, barakojn kaj dometojn.
Tie popolamason tute bruan,
izolitajn ĉi tie kelkajn homojn.
En la vojo jam estas ĝoj', feliĉo;
ankaŭ male malĝojoj kaj doloro,
kaj avaraj riĉuloj, kaj tre ofte
vantaj honorigitaj malsaĝuloj;
tamen estas sciencaj multaj viroj,
sed pri kiuj ceteraj ne atentis;
malriĉuloj ja estas, kiuj ploras;

malsanuloj eĉ estas, kiuj krias!
En miksaĵo de lukso kaj ĉifono
estas la malestimo kaj malamo,
l' egoismo, envio, la suspekto,
ambicio, malvirto, rabo, trompo,
kaj la hipokritec', kaŝem,' perfido;
batalado senĉesa kaj kruela!

Inter fumo, la polvo kaj bruego,
jam mi vidis faladon de la tronoj,
vidis mi la naskiĝon de nacioj,
de pasioj, ideoj, interesoj.

Kia la konfuzego malagrabra!

Kial mi ne forlasis mian volon,
je l' komenco tre bela kaj feliĉa?!

Kial volis mi tutan vojon vidi
kaj mi petis insiste kondukiston?!

Laca, pro ne mallonga mia vojo,
de l' veter' la vizaĝ' malbeligita,
blankigitaj la haroj de la polvo,
malproksime ne vidas mi la finon.

Jam kun ruza rideto malagrabra
la demon' al mi turnis sin kaj diris:
«Ĉion vidis vi; nun mi forveturas.»

Kaj mi al li: «Malluman tiun groton
ne vizitis mi; tion mi deziras.»

La demono: «Ne tien mi eniros.

Vi eniru, sed sola; vin mi lasas...

Eble ĝis la revido.» Li foriris.

La profunda kaverno nigra estis

sed en fundo radiis hela lumo ;
meze sidis tre bela simpatia
kaj gracia virino, kiu montris
rezignitan vizaĝon, ne kontentan.
Min ŝi tute senmove rigardadis
kun mieno serena kaj trankvila,
inda, dolĉa, honesta kaj bonvola,
tamen melankolia kaj malgaja.
Respekteme humile mi demandis
dum la koro batadis simpatie :
«Kiu estas vi honorinda, bela,
tamen pro malestimo forgesita !
Kiu estas vi ? Diru !» «LA JUSTECO !»

ALVENU MUZO

Hodiaŭ mi alvokas mian muzon,
kaj ne malgranda estas mia peno
por vidi ĝin kun dolĉa la mieno,
l'inspiron doni tuje kaj l' amuzon.

Ĉu montros al mi sian la ĵaluzon
ŝi eble per malŝat' kaj abomeno ?
Ĉu falis en min ia la malbeno ?...
En mia cerb' mi trovas nur konfuzon !

Ĉu verkos mi pri temo poezia ?
Ĉu pri legendoj ? Ĉu pri historio ?
Mi verkos pri afer' filozofia...

Ne!... Sed... mi kion verkos? Mia Dio!
Forlasis tute min la muzo mia!
Pri kio ja mi verkos?... Pri nenio!

NATURO VEKIĜAS

Finiĝas vintro; de la ĉielo
forflugas densa griza mantelo.
Lumigas Sun' Naturon jam tutan.
Natur' forlasis dormon tutmutan.

De l' arboj nudaj en la skeleto
jam sin elmontras la folieto.
Jam en l' aero blua kaj hela
tre gaje kantas birdo la bela.

Karesas vent' varmeta la monton,
glacion fandas, naskas la fonton.
La neĝ' fandita sur la deklivo
heroldo estas pri la novvivo.

Ĝi, trapasante, nutras la teron
kaj milde fluas en la riveron,
ĉi tiu saltas supren la barojn
floretojn nutras, vestas kamparojn.

Malfermos juna la printemp' florojn,
revenas eĉ juneco en korojn,
kaj en dolĉeta bela vetero
l' Amdio flugas jam tra l' aero.

Jam ĉiuj koroj estas pli molaj
animoj ĉiuj estas bonvolaj...
Verŝajne Dio Mondon jam benas :
la vivo estas, kiu revenas !

L A M O R A L I S T O

Kun mien' serioza kaj severa,
per parolad' frapanta kvazaŭ vipo
ĵetis la moralist' de sia lipo
la malaprobbon, ĉu per voĉ' sincera ?

Diris li—ne li estis hom' malklera— :
«Virto ja estas kvazaŭ forta ŝipo,
rekta baston', nekurbigebla ŝtupo,
aŭ konstruaĵo granda ŝtono-fera.

Ĉiu malvirto estas demonarto.
Vino forlasu, ludon kaj virinon,
ĉar de la virt' devenas la bonfarto.»

Sed li, drinkinte, kaj drinkinte vinon,
kaj disĵetinte monon per ludkarto,
ĵetis sur liton belan amatinon.

HO, TIMIGA ESTONTECO!

Jam forkuris maljuniĝinta jaro.
Ĉu ĝi donis feliĉon al Homaro?
Ĉu ĝi malfeliĉigis nian Mondon?
Ne deziras mi koni la respondon.

Al ni jaro alvenis ĵus, alia,
gaja, kvazaŭ infano simpatia ;
gaja, kvazaŭ infan' kun koro mola,
kompatema, afabla kaj bonvola.

Ankaŭ ĝi maturiĝos kaj la tagoj
ĝin instruos pri la malbonaj agoj ;
por ĝi la maljuneco jam alvenos,
multaj homoj ĝin ankaŭ eĉ malbenos.

Sed ĉu ne plu jam estos am' kaj fido
sano, ĝojo, feliĉo, kaj eĉ rido?
Jes, sed regos samtempe la doloro,
malriĉeco, la malgajec' kaj ploro,

sangverŝado, la larmoj kaj korpremo,
bataladoj, ofendoj, kri' kaj ĝemo!
Jar' ĉi tiu, ĉu estos pli kruela?
Kontraŭ ni, ĉu jam estos vol' ĉiela?

Mi ne volas nun esti, do, profeto
sed rapidu ĉielen mia peto,
kaj akceptu ĝin l' indulgemo Dia...
Dio savu vin, Patrolando mia!

ĈU HONTEMO?...

ĈU HIPOKRITECO?

—Ĉu vi aŭskultos mian kanton?
Ĝi estos kanto poezia...
Nu, tuj eksonos kanto mia ;
aŭskultu vian adoranton.

—Amanton mian !... Sed ĉu vere?
—Jes, ĉar la veron diris mi ;
mi diris tion, kredu vi,
ĉar mi parolis tre sincere.

—Nu ; diru tion ĝis la fin',
sed per parolo milda, mola ;
ha, diru tion al mi sola,
sed ke neniŭ sciŭ ĝin.

.....
—Via pasio ĵus venkinta
montriĝos eble sur la koro ;
sed mia ne, ĉar mi, Sinjoro !,
estas virin' edziniĝinta.

ATENTU JUNULINO!

Papili' en floraro
kun brilriĉa koloro
flugas, sola de floro
al la flor', ĉu laŭ paro.

Gaja vivo amuza
movis ĝian animon,
ĝi ne konis la timon,
ĝi naiva, ne ruza.

Pasas lumo plenpura,
kaj alvenas vespero,
ankaŭ same danĝero
de l' vesperto terura.

Se ĝi ne rifuĝlokon
serĉas, floron jes, belan ;
ŝatas lumon brilstelan,
ne de l' dormo l' alvokon.

Sed jen fino de l' festo
tra l' arbaro malhela :
en la buŝo kruela
de malbela la besto.

Bela vi, junulino,
gaja ĉe la mondbruo,
ĉu vi pensas ke l' ĝuo
sekvos vin ĝis la fino?!

Celu vivon feliĉan
puran, same honestan,
serĉu floron modestan,
serĉu ne la plej riĉan.

Kiu serĉas floron
riĉan, vantan nur brilon,
eble perdos trankvilon
ĝojon kaj eĉ honoron.

SPARU VIAN SANGON

Ne celdirektu min per viaj sagoj,
ĝi ne estos utila,
kaj vi nur ĝenos min per viaj agoj,
sed mi restos trankvila ;
pasadis mi tre longan la vivadon
kaj sentis mi suferon kaj doloron
videtis mi de l' sorto nur la radon
kaj ĝia prem' frakasis mian koron.

Momenton nur rigardu min ; infano !
mi jam estas maljuna ;
ne estu malavara via mano
je la sag' dolorpuna.
Min multe malmoligis la sufero,
ne sentas jam plu mia la spirito,
mi restas ve jam tute sen espero,
ne puŝas min jam emo kaj ekscito

Fiera estis la ŝtoneg' sur roko,
sed, puŝate de l' vento,
ĝi en profundon, de la lok' al loko,
falas je la momento.

Ne restas plu de la ŝtoneg' figuro,
refrapoj faris el ĝi nur pecetojn,
sed la potencaj fortoj de Naturo
disrompas ne malgrandajn ŝtonetojn.

Mi rulis ankaŭ de l' supraĵ' al valo
serĉi amon kaj gloron,
sed la teruraj puŝoj de l' Fatalo
vundis mian koron.
Jetpafu ne la sagon akrapintan,
mi plu ne havos sentojn jam bonvolajn
ne vi fortregos koron jam mortintan
nek vundos sago restojn jam malmolajn.

AL KOLUMBO

Vi trafis per kuraĝ' kaj per talento
la celon de plej granda l' aventuro ;
vi venkis povajn fortojn de l' naturo,
ĉar vin respektis fulmo, mar' kaj vento.

Vi la perfidon de l' envia sento
ja venkis, ĉar ofendo nek cenzuro,
nek eĉ la kalumnio kaj murmuro
al vi, do, rabis gloron laŭ fragmento.

De multaj novaj civilizacioj
grandega via faro estis fondo
kaj origin' de rasoj kaj nacioj.

Vi estis reĝo de la mara ondo.
Eterne gloru la generacioj
vin, eltrovinton de la Nova Mondo!

SALUTO (1)

Dum ni trinkas kelkajn gutojn
en gajeco la kampara,
al amiko nia, kara,
sendas korajn ni salutojn.

Festas ni la datrevenon
de l' naskiĝ' de bela nia
kara lingv' internacia.
Ĝi ricevu Dian Benon!

Ni bedaŭras, vi ne festas
tian tagon tie ĉi;
tamen kredis, ke ĉe ni
plenspirite vi kunestas.

Tial ke la saman emon
havas ĉiu, kiel mi,
ĉiu sendas nun al vi
sian koran la brakpremon.

(1) Sendita al S-ro Vicente Inglada okaze festi la 25an datrevenon de la naskiĝo de Esperanto.

NEĜO KAJ FAJRO

Amodio ĉiam juna, tia ne mi estas ;
tamen en la koro mia loko por li restas ;
sed, ĉar sub unuaj neĝoj brulas mia flamo,
silentigi devas mi la voĉon de la amo !

AL F - i n o C . S .

Ho, fraŭlino simpatia !
Samideanino mia,
via dolĉa rememoro
flugos ne de mia koro !

AL F - i n o D . S .

Kiam mi vidas vian vizagon,
mi rememoras mian nunagon ;
via beleco estas, ho !, suna,
kaj mi ne volus esti maljuna.

BELA BRUNULINO

Via belo estas dia,
vi hispana brunulino
estas rava la diino,
hela sun' andaluzia.
Tiu ĉi kanteto mia

inda je vi ne ja estas,
sed en mia koro restas
jam nenio ; ĝi malbona,
neagraba, nebelsona,
tamen miron, do, atestas.

JAM ESTAS AMINDA LA VIVO

Mi jam sen espero
estis en la tero,
kaj jam mia voĉo silentis ;
mi, pri kio vidis,
malestime ridis,
koron tre malgaja mi sentis.

Tra la Ter' kaj Maro
kaj ĉe la Homaro
mi nek bonon trovis, nek belon,
mi malŝatis ĉion,
mi nur amis Dion ;
perdis mi de l' vivo la celon.

Sed nun vin mi trovas,
ami jam mi povas ;
jam per kanti estas motivo :
Ho, vizaĝo bela !
Ho, spirit' anĝela !
Estas jam aminda la vivo !

ĜI ESTAS REVO!

Ĝi estas rev' sendube, sed mi vidas
palacon, kiu sidas
ĉe la ĝardeno bela
kaj lumigata de la suno hela ;
ĝi estas konstruaĵo arabstila
ĉe la pejzaĝ' pentrinda kaj trankvila.

Tre malproksime, ĉe marokmontaro,
de l' bruoj de l' homaro,
sub pura la lazuro,
juvel' gardata kvazaŭ de l' Naturo ;
kaj kiel belartaĵo delikata
ĝi staras, paradizo nekonata.

Arkaĵojn ornamitajn kaj kolonojn,
tre luksajn la salonojn,
kaj kortojn, kaj fontanojn,
kaj parfumantajn refreŝigajn banojn ;
amuzon kaj komforton, kiuj ravas,
mirinda tiu konstruaĵ' enhavas.

Kaj de ĉi tiu tuto da beleco,
trankvile en soleco,
de tiu ĉi artaĵo,
de tiu ĉi mirinda konstruaĵo,
mi estas posedanto tre feliĉa
ho, kvazaŭ la kalif' potenca, riĉa !

Vespero bela estas, kaj la suno
jam cedas al la luno
estrandon de l' ĉielo ;
vidiĝos baldaŭ la unua stelo ;
Naturo paca kaj ĉielo brila !
Ravanta la veter' printempaprila !

Mi kun araba vesto kaj turbano,
pafilo ĉe la mano,
kaj per majesta pozo,
konfide, kun nezorgo kaj ripozo,
sur la fortika korpo de l' ĉevalo
fiere supreniras el la valo.

Alvenas mi, eniras en edenon,
trapasas la ĝardenon ;
servistoj tuj alvenas
la piedingon kaj la bridon tenas ;
mi saltas tuj en teron kaj sopiras,
mi en palacon kun plezur' eniras.

Salutas min humila servantaro
tra luksa la ŝtuparo,
alvenas mi haremon ;
en kor' mi sentas emocian tremon,
ĉar vokas min per sia voĉ' amata
unua la edzin', la favorata.

Kaj kvazaŭ sag' brilega de l' Amdio,
la lasta sunradio

eniras la salonon,
en kiu aŭdis mi l' amatan sonon ;
en miajn brakojn ĵetas sin virino,
ŝi estas mia bela ĉefedzino !

Sed, ve !, ĝi estas rev', nur iluzio ;
malvera fantazio...

Sed tamen, estas vera
ĉi tiu lasta frazo tre sincera :
vi, rava, ĉarma, mia la trezoro,
ja estas sultanin' de mia koro !

CIELO KAJ TERO

Konis mi en bela land' anĝelon,
ŝi prezentas al mi la ĉielon

kaj inferon, ĉar min kaptis amo,
kaj ĉe mia kor' bruladas flamo.

Ha ! Ĉu estas ŝi kerub' ĉiela,
ankaŭ ja terestulino bela.

Ĝ estas vere mia am' miksaĵo,
ĉar en min ŝi, tiu ĉielaĵo,

ĉiam vekas emon al la bono ;
sed samtempe faras min demono.

Dolĉa sento kaj eĉ pura, mia
sento estas vere poezia ;

kiel rava, bela, delikata,
estas ŝia korpo tre amata.

Sed samtempe sentas mi kolere
boli brue sentoj eĉ infere,

el la Brust' forkuras la sopiro
de pasia kaj ardanta viro.

Sin mi metus sankte sur altaron,
kantus mi fervoran la preĝaron ;

per tre bonodora la parfumo,
kaj per hele blindiganta lumo,

ŝin adorus ĝis la vivofino ;
por mi ŝi sanktega la diino.

Sed samtempe koro tro batanta
igas min freneze deliranta,

kaj mi, forgesante tuj preĝadojn,
aŭdigante tondraĵn la bruadojn,

kaj montrante akran la suferon,
mi altaron rompus en la teron,

forlasante baldaŭ la ruinon,
mi forportus belan la virinon :

la vizaĝon ŝmacus mi amege,
mi brakpremus korpon eĉ troege,

ĝis sangtremus ŝmaco miajn lipojn,
ĝis krakigus mi perforte ripojn ;

ĉar min puŝas tia l' am' sen timo
al deliro, al frenez' kaj krimo.

Ho, plej bela la virin' de l' Tero,
mia sola kordezir', espero !

Ho, anĝelo sankta, la plej dia,
ĉiam estos ŝi diino mia !

Ĉarma, bela, dolĉa dianĝelo,
estas nur ŝi miaj Ter', Ĉielo !

BALDAŬ LA MONDON

REGOS ESPERANTO

Ĉar homo kreskas, malgrandiĝas Tero,
ĉar kreskas pli kaj pli la homa povo
laŭ ĉia progresado kaj eltrovo,
laŭ ĉia nova kono de la Vero.

Faligas li vualojn de l' mistero,
li, reĝ' de materio kaj de movo,
per rezonad', eksperiment' kaj provo,
naturan ĉian forton igas pero.

L' antaŭe malproksima kontinento
kaj la malproksimega gent' fremdlanda
nun apudestas ; nun la vojaĝanto

rapide pli vojaĝas, pli ol vento...
Tre baldaŭ estos Tero urb' malgranda ;
la Mondon baldaŭ regos Esperanto !


LA ENVIO

Ribelon grandan kaŭzis kontraŭ Dio,
laŭ oni diras, tiu fortâ sento
tre malamika de la glor', talento,
riĉeco, de beleco kaj de scio.

Laboradante kontraŭ ĉio, kio
de bon' alia estas fundamento,
ja kiel veneniga la serpento,
malvirt' timiga estas la envio.

Por vundi ĝi forlasas ĉiam timon,
nur plaĉas al ĝi ĝemo kaj la ploro,
kaj ĝi nur ekster Tero trovas limon ;

ĝi kovas filojn en malgranda koro,
ĉu vundas korpon, vundas ĉu animon ;
la Mondon mallumigas per doloro.




R I M A R K O

La «Hispana Esperanto Asocio» tutkore dankas S-inon.
Rosa de San Millán Alonso, kiu, je la nomo de sia
familio, rajtigis ĝin por eldoni la versaĵaron de
nia glora mortinto kaj eĉ donacis 200 pesetojn
por la eldono. Per ĉi tiu, la «Hispana Esperanto
Asocio», samtempe honorante sian poeton,
honoras la hispanan esperantismon resti-
gante firme elpruvon pri genia inspiro
kaj stilo de hispano kaptita de zame-
nhofa spirito, militanta en la kampo
de helpa lingvo internacia
Esperanto.

I N D I C O

	<i>Pag.</i>
Biografia skizo.....	3
Ŝipopereó	7
La Iluzio kaj la Tempo.....	17
La aglo kaj Aeroplano.....	19
Malamika amikino.....	21
Malbona songo.....	23
Zamenhof mortis.....	26
La Stelo de la espero.....	27
Kio regas?.....	27
Forgesu ĉion.....	29
Ĉio estas malvarma.....	30
Rabita floreto.....	31
En la ĝardeno de la vivo.....	33
Ĉe Sevilla.....	35
Timu	36
Resaniĝu, ho, tero!.....	36
Ho tempo, ne rapidu!.....	37
Vanteco	39
Kantaĵo	40
Jiménez Loira! Soriano!.....	42
La Deko... La Dekdua.....	42
Si forgesita.....	44
Alvenu muzu.....	46
Naturo vekigas.....	47
La Moralisto.....	48
Ho, timiga estonteco!.....	49
Cu hontemo?... Cu hipokriteco?.....	50
Atentu, Junulino!.....	50
Sparu vian sangon.....	52
Al Kolumbo.....	53
Saluto	54
Neĝo kaj fajro. - Al F-ino C. S. - Al F-ino D. S.	55
Bela brunulino.....	55
Jam estas aminda la vivo.....	56
Ĝi estas revo.....	57
Cielo kaj Tero.....	59
Baldaŭ la mondon regos esperanto.....	61
La envio.....	62
Rimarko	63



HISPANA ESPERANTO ASOCIO

estas tutlanda organizaĵo por propagandi kaj progresigi Esperanton en tute neŭtrala kampo, for de ĉia politika, socia kaj religia, idealo. Ĝi konsistas el individuoj, kiuj, tamen, restas tute absolute liberaj por grupiĝi loke, regione, profesie eĉ ideale, al plej vigla kaj efika propagando kaj progresigo de Esperanto en siaj respektivaj kampoj kaj medioj; kaj por tiu vigla kaj efika laboro la Asocio donos ĉian helpon eblan. Rekomendinde estas, ke la membroj de la Asocio fondu grupojn eĉ federaciojn el grupoj, kaj same la grupoj kiel la federacioj povos esti ankaŭ membroj de la Asocio kiel se ili estus individuoj, pagante la ĝeneralan kotizon ĉiujaran el DU PESETOJ. La kotizo donas la membrecon kaj la ĉiumonatan oficialan organon «Hispana Esperanto-Gazeto» senpagan.

La Asocio celas havigi ankaŭ al la Esperanto-istoj kiel eble plej malmultekoste, kiel ĉi tiu, aliajn eldonotaĵojn, elpruvante tiel utili la organon.

Adreso: SAGASTA, 10 (CRUZ ROJA ESPAÑOLA) - MADRID - HISPANUJO.